estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 232 — Aŭgusto, 2005

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## 55 PROCIONIDOJ



La procionidoj estas ofte tre malsovaĝaj kaj dorlototentaj: vivantaj pluŝursoj. Ĉi tiu aĝas proksimume kvar semajnojn, kaj pro tio la tipa masko de bandito ankoraŭ ne tute evoluis.

Imagu! Kvindek kvin etaj ŝtelistoj en unu loko. Tion, inter aliaj aferoj, mi vidis kiam mi lastatempe vizitis la Orientmarbordan Centron por Rebonstatigo kaj Savo de Sovaĝbestoj [Eastern Shore Wildlife Rehabilitation and Rescue Centre] en la eta vilaĝo Seaforth, je kelkaj kilometroj oriente de Halifax-Dartmouth. Tie, en kaduka farmdomo kaj kelkaj neimponaj garbejoj kaj ŝedoj loĝas proksimume cent tridek kvin kriplaj birdoj kaj mamuloj kaj orfaj idoj. Teamo de vartantoj, kiuj senpage donas la tempon kaj laboron nur el amo, prizorgas la senhelpajn bestojn.




Plenkreskiĝinta prociono en la naturo. Tiaj atingas pezon de inter 4 kaj 15 kilogramoj.Ĉi tiu besto ne lavas la manĝaĵon sed serĉas kankrojn por manĝi.

Ĉi tiun bestorifuĝejon fondis antaŭ dek jaroj Hope Swinemar, administranto de Veterinara Kliniko. Ŝi komprenis la bezonon pro tio ke homoj ofte portis al la kliniko diversajn vunditajn kaj senpatrinajn bestojn. La organizaĵo estas tute sendependa, kvankam ĝi ricevas jen kaj jen iom da mono de la registaro. La precipa fonto de mono estas kontribuoj de individuoj kaj firmaoj. La

senĉesa kosto de la manĝajo, la varmigiloj, la elektro, la medikamentoj kaj la tukolavado estas granda. Veterinaroj kontribuas siajn servojn senkoste.

Inter la bestoj en la rifuĝejo, kiam mi vizitis, estas 1 cervido, 1 kuniklo, 1 tamiido (striita sciurido), 8 ruĝaj sciuridoj, 1 nigra sciurido, 2 rakedpiedaj leporidoj, 1 mikrotido, 1 pinmarteso, 1 marsupiulo kiu alvenis de Aŭstralio, kaj 1 ruĝa vulpo al kiu unu gambo mankas. Inter la birdoj estas 8 korvidoj, 1 enorma korakido, 8 anseridoj, 1 nigra viransero, 4 rubekolidoj, 2 vintraj emberizidoj, 1 paserido, 2 strigidoj, 8 kolombidoj kaj proksimume 30 sternidoj. La precizaj nombroj ŝanĝiĝas preskaŭ ĉiutage.



Preskaŭ tempo por suĉmanĝi. La procionidoj interesiĝas pri tio kio okazas ĉe la tablo.

Oni rajtas demandi, kial preskaŭ duono el la enloĝantoj estas procionoj? La prociono [Procyon lotor], besto indiĝena en Nord-Ameriko, estas fleksebla kaj adaptebla besto kun tre diversa dieto. Procionoj troviĝas ne nur en la arbaro sed ankaŭ en urboj, eĉ en la mezo de Toronto. Ĉirkaŭ Halifax homoj al si proprigas la arbaron por konstrui domojn. Multaj bestoj foriras aŭ mortas pro la invado far homoj. Tamen, procionoj ŝanĝas la dieton kaj la vivmanieron por pretervivi. Se kankroj mankas, la forĵetaĵoj de via kuirejo bongustas. Se ne estas arbo por la nesto, bone – ŝedo aŭ dommansardo estas taŭga loko por naski kaj prizorgi la idojn. La homoj kaptas la patrinon per kaĝokaptilo kaj liberigas ŝin en la fora arbaro. Nur poste oni eltrovas, ke ekzistas ankaŭ idoj kaj liveras ilin al la rifuĝejo.



Kvarfoje ĉiutage oni pretigas la botelojn kun la receptaĵo por la suĉuloj.

Unu ŝedo estas la „suĉejo”. Tie loĝas la etaj mamuloj kiuj ankoraŭ nutriĝas per lakto. La suĉejo estas relative varma. Tie ĉiu gefrataro estas en aparta kaĝo. Ĉe la kaĝoplanko estas tukoj kaj elektra varmigilo. Antaŭ ĉiu kaĝo pendas paperfolioj por priskribi la dieton, medikamenton, problemojn, kaj kiam la etaj gastoj lastatempe suĉmanĝis.



Oni devas disponigi botelon de la nutraĵo al la procionidoj unuope. Imagu la kvanton de la laboro!

Oni manĝigas la procionidojn kvarfoje ĉiutage. Oni pretigas la botelojn de lakto modifita laŭ recepto, plimalpli same kiel por la homaj beboj. La vartanto nutras ĉiun bebon individue. Kiam unu procionido estas kontenta, oni metas ĝin en korbon kaj atentas la gefratojn. Kiam ĉiuj de unu kaĝo estas nutritaj, oni purigas la kaĝon, reenmetas la suĉintojn por dormeti, kaj turnas la atenton al la sekvanta kaĝo. Feliĉe, unu botelo da receptaĵo kutime sufiĉas por pli ol unu ido.



Estas amaso de procionidoj en la apartamento por la duonkreskintoj. Tie ili manĝas laŭplaĉe kaj dikiĝas por la venonta vintro.

Procionidoj suĉnutriĝas ĝis la aĝo de proksimume ok semajnoj. Poste ili tranloĝiĝas al la komuna loĝejo por la duonkreskintaj procionoj. Tie ili manĝas viandon, ovojn, frukton kaj sekigitan manĝaĵon similan al tiu kiun oni aĉetas por hundoj. Pendas ankaŭ botelo kun receptolakto, por tiuj kiuj deziras. Estas ankaŭ granda baseno da akvo kie la bestetoj povas trempi la manĝaĵon por „lavi", laŭ la prociona kulturo. En tiu ĉi „adoleskejo" ili manĝas, dormas kaj ludas kune.



Tamen, ili restas sufiĉe ĉarmaj kaj scivolemaj. Rimarku, ke la muzelo komencas akriĝi.

La procionoj kiuj naskiĝis en la printempo atingos la seksmaturiĝon en la unua aŭtuno, malgraŭ ke ili ankoraŭ ne estos atingintaj la maksimuman grandon kaj pezon. Tiam, ne plu ĉarmaj dolotobestoj, ili fariĝas batalemaj, eĉ atakas siajn vartantojn. Ili ja estos pretaj reveni al la naturo. Oni liberigos ilin en apartaj lokoj de la fora arbaro. Ili ne havis patrinon por instrui, kaj ni povas nur esperi, ke la fortaj instinktoj, kiujn naturo provizis al ili, sufiĉos por ebligi ilin travivi en la natura stato.



La aŭtoro kun nova amiko

Estos „malferma tago" ĉe la centro je la 28a de aŭgusto, 2005, inter la horoj 1200 kaj 1600. La loko estas 2909 Ŝoseo 207, Seaforth, NS.

— Steĉjo

## La Naŭa Regiona Ŝignekto-centra Heredaĵa Foiro en Nov-skotio

La 6-an de majo, 2005, ĉe la Komunuma Kolegio de Nov-Skotio en Truro,okazis la naŭa Regiona Heredaĵa Foiro de la Ŝignekto-Centra (angle Chignekto-Central) Lerneja Distrikto. Kompreneble ni fieris, ke ĝi ankoraŭ restis kiel unu el la plej grandaj Heredaĵaj Foiroj en Kanado, kvankam nia provinco estas unu el la plej malgrandaj provincoj de nia lando. Preskaŭ ĉiuj, kiuj laboris dum la Foiro estis volontuloj, entute almenaŭ 670 personoj - inkluzive de la juĝantoj, instruistoj de la diversaj lernejoj, personaro de la Komunuma Kolegio kaj la Regiona Lerneja Distrikto, gepatroj de la studantoj, tiuj kiuj instruis la instrukunsidojn, kaj aliaj.

Denove, la specoj de la projektoj estis diversaj kaj la geknaboj faris multe da esplorado kaj laboro por prepari siajn montraĵojn kaj lerni pri la historia signifo de tio, kion ili prezentis. La juĝantoj faris demandojn pri la prezentaĵoj kaj oni estis juĝita ne nur pri la bona aspekto de la montraĵo sed ankaŭ pri la ĝusteco de la respondoj. Ĉar Kanado estas multnacia lando, kies loĝantoj devenis de ĉie en la mondo, vi povas imagi kiel interesaj, diversaj kaj allogaj estis tiuj projektoj kaj ankaŭ la subjektoj kaj montraĵoj.

Ĉi-jare partoprenis 44 lernejoj el nia Regiona Lerneja Distrikto. Ĉiu lernejo okazigis sian lokan Heredaĵan Foiron kaj oni juĝis 1,477 diversajn projektojn ĉe tiuj lernejaj Foiroj. La 356 premiitaj projektoj de tiuj lokaj Foiroj estis registritaj en la Regiona Foiro en Truro, kie 62 juĝantoj juĝis ilin. Ĉar pli ol unu persono povus labori pri ĉiu projekto, 410 gestudantoj atendis la juĝantojn por montri kaj klarigi siajn projektojn. Multaj iom stresiĝis ĉar ili devis atendi dum sufiĉe longa tempo por esti juĝitaj. La ĉi-jara premio estas senpaga semajna vojaĝo dum julio al Saskatoon, Saskatchewan, por renkonti la aliajn regionajn premiatojn kaj lerni senpere pri la historio kaj kulturo de tiu regiono. La regiona premiato estis Courtney Blois el la Rawdona (angle Rawdon) Distrikto kie mi loĝas. Ŝia projekto estis pri la kreskigo de sovaĝaj mirteloj en Nov-Skotio, kiu estas grava industrio de nia provinco.

Posttagmeze 21 instrukunsidoj okazis kaj, kompreneble, mi instruis Esperanton. Partoprenis 15 geknaboj, kaj ankaŭ ĉeestis tri plenaĝuloj kiuj scivolis pri Esperanto kaj volis lerni iom pri nia Internacia Lingvo. Mi bonvenigis ĉiujn kaj dum 50 minutoj klarigis iom pri la historio de nia lingvo, instruis iomete da gramatiko kaj la kantojn „Esperanto-Alfabeto” kaj „Ruĝa Pomo”, kiuj estas sufiĉe facilaj por komencantoj. Mi ankaŭ parolis pri Esperanto kiel pont-lingvo kiu helpus la postan lernadon de aliaj fremdaj lingvoj (kiel la franca), kaj pri la senpaga poŝta kurso, U.E.A., Universalaj Kongresoj, la Pasporta Servo, TEJO, ktp. Mi montris kelkajn Esperantajn librojn kaj disdonis flugfoliojn kaj instigis ilin traduki la alineon „Inteligenta persono lernas la lingvon Esperanton ....”, kiun ili sufice bone tradukis kun nur iomete da helpo. Al la tri plenaĝuloj, mi donis ekzemplerojn de la unua leciono de la poŝta kurso, kaj respondis al iliaj demandoj post la kunsido. Poste mi opiniis ke la geknaboj ne estis tro ekscititaj pri mia instrukunsido sed ili estis ĝentilaj kaj kunhelpemaj, kaj tre bone kantis, do mi estis kontenta pri la afero.

Tamen mi surpriziĝis kiam Shirley Nicoll, la Regiona Kunordiganto de la Heredaĵa Foiro, kontaktis min por diri ke ŝi ricevis leterojn de kvin studantoj de Ruĝklifa Mezlernejo (angle Redcliff Middle School) en Bible Hill. Ili estis inter la geknaboj kiuj partoprenis la instrukunsidon. Ili dankis ŝin pro la ĝuinda Foiro kaj menciis, inter aliaj aferoj, ke ili ŝatis la Esperantan instrukunsidon kaj trovis ĝin interesa. Estis la unua fojo ke oni skribis tiajn leterojn, do mi telefonis la lernejestron de tiu lernejo kaj ni aranĝis daton kaj tempon por prezenti al la kvin gejunuloj gvidilojn kiun mi ricevis de la Brita Esperanto-Asocio por disdoni, kune kun diversaj aliaj Esperantaĵoj kiel libretoj kaj informfolioj. Do, mi veturis al Bible Hill kaj re-renkontis kvar el la kvin gejunuloj (tiun tagon unu el la kvin ne ĉeestis la lernejon) kaj disdonis la gvidilojn, ktp. Mi ankaŭ faris demandojn al ili kaj miris ĉar ili respondis ĝuste al miaj demandoj.

Mi demandis al mi - se ili povus memori tiom, post nur 50 minutoj de instruado, kiom ili povus memori se mi vere povus instrui ilin en lerneja klaso dum lerneja jaro? Tio estas interesa demando, ĉu ne?

— Kim Keeble